# La Krokodil'



**n°65**
**majo**
**2011**

**Informilo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo**

**En tiu ĉi numero**
***Dans ce numéro***

Nova Redaktantino ..................1
Miaj memoraĵoj de IREM: inter laboro kaj muziko......................2
Interasocia Renkontiĝo en Seto (22 – 25 Aprilo 2011).................3
Internacia Junulara Festivalo en Ligurio......................................3
L'agenda du Kroko'...................4

*"La Krokodil'" est le bulletin d'information du Centre Culturel Espéranto de Toulouse, association pour la promotion et l'enseignement de l'espéranto. Si vous souhaitez contribuer au "Krokodil'", merci de nous faire parvenir vos articles et photos.*
*Tous les articles du "Krokodil'" sont mis en ligne sur le blog, où il est également possible de laisser des commentaires.*

**Visitez notre blog "La Krokodil'"**
*http://lakrokodil.wordpress.com/*



**ESPERANTO-KULTUR-CENTRO DE TULUZO**
*Centre Culturel Espéranto de Toulouse*
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 - 06 31 68 00 26
E-mail : esperanto.toulouse@free.fr
Site : www.esperanto.toulouse.free.fr

## NOVA REDAKTANTINO

Saluton, karaj legantoj kaj abonantoj de « L' Krokodil' »!



Anjo - la nova redaktantino

Dum du monatoj mi – Hanna Mykytyn (Anjo) – redaktos la blogon kaj bultenon de la asocio.

Mi estas volontulino el Jalto, agrabla urbeto ĉe Nigra maro, kiu situas en suda parto de Ukrainio – Krimeo.

Do, por prezenti min, mi iomete rakontos pri miaj aktivaĵoj ambaŭ en Ukrainio kaj ĉi tie.

Mi estas studentino en Krimea Universitato pri Homaj Sciencoj kaj studas lingvojn kaj literaturon, do estas lingvistino, kaj fakte pro tio interesiĝas pri multaj lingvoj, kiujn mi de tempo al tempo uzas – la franca, la angla (tiuj estas lingvoj kiujn mi universitate studas), la rusa kaj ukraina (miaj denaskaj lingvoj), la pola kaj esperanto.

Pri esperanto kiel internacia komunikilo mi eksciis antaŭ ne tiel longe, nur ekde la aŭtuno, dank' al E-kursoj, kiuj konstante okazas ĉe mia universitato, fare de la loka E-klubo. Post kelkaj monatoj mi jam iĝis aktivulino de la loka esperantjunularo,

partoprenis pli-malpli gravajn lokajn E-aranĝojn, kaj konatiĝis kun la Jalta E-teatro « Improvizo », kie poste mi ekaktoris. Fine de la kursoj, ni decidis partopreni nian (parolinte pri novuloj) unuan internacian renkontiĝon – JES en Burgo, Germanio dum kiu ni konatiĝis kun multaj mojosaj esperantistoj kaj esperantistinoj, eksciis pri interesaj E-projektoj de tutmondaj kaj naciaj E-asocioj, kaj fakte pri tiu ebleco volontuli ĉi tie, en Tuluzo.
Postnovjare, jam mi mem ekgvidis E-kurson ĉe mia universitato, dum kiu ni sukcesis partopreni iom da ukrainaj renkontiĝoj (10-a jubileo de E-sekcio de Jalta montara klubo, tutukraina renkontiĝo en Odeso « Humurino », E-klubaj renkontiĝoj kaj kunsidoj, teatrovespero, ktp.). Des pli, la novuloj havis eblecon iomete praktiki sian lingvon, ĉar ni havis gastojn – Ben Indestege, fama esperantisto kaj vojaĝanto el Belgio, kaj KeKe, aŭstralia esperantisto, kiu nun loĝas en Finnlando.

Krome, mi interesiĝas pri diversaj junularaj asocioj, kiuj aktivas ĉe mi, kiel Rotaract Klubo, tutmonda junulara organizo, studentasocio de mia urbo, ktp.

Ĉi tie, kadre de la volontulado, mi planas partopreni kaj eble helporganizi diversajn asociprojektojn, kiel Eŭropajn tagojn en Tuluzo, lingvofestivalon, lernsemajnfinon en Pireneoj kaj ĉion por kio taŭgos mia helpdeziro.

Do, mi esperas, ke ni ĉiuj profitos tiun mian ĉeestadon, kaj ambaŭflanke ĝuos eblecon malkovri la kulturojn unu de aliaj kaj eblecon uzi por tiu celo esperanton.

Anjo

## MIAJ MEMORAĴOJ DE IREM: INTER MUZIKO KAJ LABORO

Unue, la bunta programo, kiel kutime ne ebligis partopreni al ĉio, kio ŝajnas interesa. Mi devis do elekti, kaj trovi tempon por ankaŭ viziti la libroservon. Feliĉe, ne nur francoj -kutimaj krokodilantoj- partoprenis tiun renkontiĝon, mi renkontis rusinon, afrikanon, belginon, kubaninon, italon...

Mi ĉeestis, kiel komitatano, laborgrupojn kaj oficialajn kunvenojn de UFE (Espéranto-France), sed ĉar tiu kongreso estas "interasocia", ankaŭ SAT Amikaro, FET, FFEA (internaciaj fervojistoj), Esperantistaj Katolikoj, GEE (instruistoj), EDE, planis tiam sian ĝeneralan kunvenon.

Okazis prelegoj pri la okcitana lingvo, la petskribo por Esperanto en abiturienta ekzameno, pri historio, esperanta literaturo...

Priatentindaĵo : Intersasociaj laborgrupoj kaj ekzamenoj kadre de la eŭropa referenckadro (Katalin Kovats surlokiĝis) efektiviĝis, kiuj ambaŭ gravas por la disvolviĝo de la movado.

Oficiale estas surmerkatigata de Vinilkosmo la disko de Jacques Yvart "Brassens plu". La kantisto elĉerpis plezurige sian tutan repertuaron por la esperanta kaj ne esperanta publiko en koncertejo de la urbocentro. Dua oficiala lanĉo temas pri la filmo "Le monde de l'espéranto" farita de Dominque Gauthier, la filmon ni spektis en granda enurba kinejo.

Ĉiu vespero, ni povis ĝui koncerton de Jomo, Patric (en la okcitana), Kaj Tiel Plu, Kapriol, Famo kaj ni eĉ profitis teatraĵon de TTT (teatra tuluza trupo).

Nu, multaj vidindaĵoj, novaĵoj, farendaĵoj, ne tiom strange ke dum kongreso oni ne havas sufiĉe da tempo por vidi amikojn !

Nicolas Gaufillet

### INTERASOCIA RENKONTIĜO EN SETO (22 – 25 APRILO 2011)

Preskaŭ 400 esperantistoj kunvenis ĉe la festo en Seto. Pli ol 50 estis nefrancaj. Proksimume 35 venis de la regiono « Ĉepirenea Sudo ». Mia fratino Renata el Aĝeno kaj mi, ni ofte akompanis du rusanojn el Moskvo kaj paron rusan kun infano el la fora urbo Krasnojarsk! Alia paro venis el ... Nepalo!

Dum ĉiuj vesperaj spektaloj mi ĉeestis. FaMo kaj Jacques Yvart kantis kun propra akompano per akordiono aŭ gitaro, Kaj Tiel Plu... Kaj Kapriol' dancigis multajn spektaklojn. Post la teatraĵo de TTT, JoMo gitaris kaj kantis dum du belaj rusinoj dancis. La publiko ĉiam ŝategis la kvaliton kaj etoson de ĉiu spektaklo.

Malpli da kongresanoj partoprenis la seriozajn kunvenojn. Mi rakontos nur kelkajn detalojn pri tiuj, dum kiuj mi ĉeestis.

Debata kunveno de EDE, Eŭropo – Demokratio – Esperanto komenciĝis kun 30 personoj kaj finiĝis kun 50. Italo memorigis, ke 50 eŭropdeputatoj grupiĝas por promocii esperanton. Mi sugestis, ke ni konsilu voĉdoni por jam ekzistanta partio, kiu subtenas esperanton, ekzemple la Verduloj, kiuj havas E-komisionon. Neniu eĥo krom tiu gurditaĵo: mi ne fidas la aktualajn partiojn.

En la du plenkunsidoj de SAT-Amikaro partoprenis ankaŭ 30 komence kaj 50 fine kongresanoj. Multaj intervenis, precipe Serge Sire, kaj Robin Beto. Finfine mi eksciis, ke tiu ĉi festo estos pere de la regiono « Ĉepirenea Sudo ».



La filmo ĵus realigita por SAT estis projekciita en la urba salono. Sed preskaŭ neniu neesperanta publiko ĉeestis bedaŭrinde. Mi spektis ĝin en la kongresejo kaj intervenis en la posta diskuto. Ĝi entenas multajn samecajn intervjuojn, ne klarigas la signon de SAT; eĉ ne aperas tiu de UEA. Dokumenta filmo devus diri ekzemple pri ĉiuj nomoj.

Resume, tiuj samtempaj kongresoj de SAT-Amikaro, UFE, fervojistoj estas fruktodonaj (la unua okazis en 2005 kaj la dua estas tiu ĉi). La etoso estis tre agrabla kaj multaj diskutis ekstere kaj dum la manĝoj. Ĉu oni debatis pri la temo. Ĉu SAT-Amikaro kaj UFE kunfandiĝu? Iu proponis tion en plenkunsido; tuj rebatis Serge Sire kun sia humuro; kial nur du asocioj?

Debataroj pri la demando: ĉu SAT devas solviĝi en UEA?

Dum la plurkongresa renkontiĝo en Seto (aprilo 2011) iuj diskutis pri kunfandiĝo de SAT-Amikaro kaj UFE. Ŝajne pli ofte ĉetable dum la manĝoj ol en plenkunsidoj. Jen kelkaj argumentoj poraj kaj kontraŭaj.

Internaciskale preferindas eble du asocioj. SAT uzas malsamajn kongreskotizojn laŭ la lando. En lokaj grupoj ŝajnas pli bone grupiĝi por organizi kursojn aŭ peti subvenciojn.

Cetere mi jam konstatis, ke UEA akceptas progresemulojn. Okazis dum la UK en 2000. tiam la prezidanto de UEA estis SATano; okazis kunvenoj de SAT, de ateistoj...

Jam antaŭ kunfandiĝi estus bone havi unue komunan kongreson UEA+SAT. Sed ĉu SAT-membroj bonvolas tion? En Sennaciulo de majo-junio 2010, iu membro refuzis referendumon pri tiu propono kaj aldonis, ke la laboristoj pagas malpli por partopreni SAT kongreson ol UKon.

Jacques Caubel



# INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO EN LIGURIO

A Pâques, je suis allé à la IJF, la rencontre Italienne d'espéranto. C'était ma deuxième rencontre à l'étranger.

Je me suis fait de nouveaux amis, principalement des Italiens, qui semblent très motivés par la langue internationale. Il y avait beaucoup de débutants, qui, comme moi, durant ma première rencontre, ont beaucoup progressé!

Il y avait des cours d'espéranto et d'autres langues. Il y a eu deux excursions, une à la mer (on s'est baigné malgré le mauvais temps) et l'autre à Gênes.

Prochaine rencontre en Catalogne!

Sébastien

# *L'Agenda du Kroko'*



*Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Christine (Kiki) au 06.31.68.00.26 / 05.61.62.39.48, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr*
***Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : www.esperanto.toulouse.free.fr.***

## MAI - MAJO 2011

**Mardi 10 mai :** ***Panorama actuel de l'espéranto, présentation publique***
Horaire : de 19h00 à 20h30
Lieu : l'ENSEEIHT, près de Saint-Aubin
Présentation, proposée dans le cadre de la semaine de l'Europe 2011 organisée par la mairie de Toulouse. Quelques jeunes de l'association (dont notre volontaire ukrainienne) témoigneront de leurs expériences de mobilité (SVE, rencontres, séminaires, festivals...) et de l'intérêt de l'espéranto, pour eux, au quotidien. Venez découvrir une langue singulière.
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Mardi 10 mai:** ***Conversation en espéranto***
Horaire : 19h30
Lieu : au foyer de l'école de commerce, 20, boulevard Lascrosses, à côté de la place de l'Europe. (Metro Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48

**Mardi 10 mai:** ***stand de l'association EKC***
Horaires : 14h00 à 17h00
Lieu: au Phare de Tournefeuille
Dans le cadre de la semaine de l'Europe 2011 organisée par la Mairie de Tournefeuille.

**Mercredi 11, jeudi 12, vendredi 13 mai*****: stand de l'association EKC sur le forum européen***
Horaires : 11h00 à 19h00 chaque jour
Lieu: chapiteau Place du Capitole
Dans le cadre de la semaine de l'Europe 2011 organisée par la Mairie de Toulouse.
Pour aider sur le stand, contactez: Christophe 06 31 80 40 07

**Du 13 au 15 mai 2011:** ***Iberia Renkontiĝo***
Rencontre internationale organisée à Sant Andreu Salou (près de Girone, Catalogne) par des Catalans, Espagnols et Portugais.
Hébergement dans la campagne catalane, concert de Kaj Tiel Plu, visite de Girone, banquet.
Une caravane partira de Toulouse (covoiturage, moins de 3h de route).

**Mardi 17 mai :** ***Début du dernier cours express de l'année avant l'été***
Horaire : 18h30
Lieu : à l'ENSEEIHT, 2, rue Charles Camichel
Objectif : s'initier à la langue et à sa culture.
Prix: voir PageCours
Organisateur : EKC
Contactez: Christophe 06 31 80 40 07 / 05 61 62 39 48

**Mercredi 18 mai :** ***Stand d'information à Empalot***
Horaire : de 14h à 18h
Lieu : avenue Jean Moulin (Metro Empalot)
Dans le cadre de la 8ème édition de "Pas de Quartier pour les Inégalités"
Initiations à l'espéranto au cours de l'après-midi.
Organisateur : AFEV
Contactez: Christophe 06 31 80 40 07 / 05 61 62 39 48

**Samedi 21 mai** ***: Stand d'information et animations sur la prairie des filtres***
Horaire : de 13h à 19h
Lieu : prairie des filtres
Organisateur : AFEV

Contactez: Christophe 06 31 80 40 07 / 05 61 62 39 48

**Dimanche 22 mai :** ***Stand d'information et animations à la fête de l'Huma***
Horaire : de 13h à 19h
Lieu : Zone verte des Argoulets
Dans le cadre de la " Fête de l'Huma 2011"
Initiations à l'espéranto au cours de l'après-midi.
Contactez: Christophe 06 31 80 40 07 / 05 61 62 39 48

**Mardi 24 mai :** ***Conversation en espéranto***
Horaire : 19h30
Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48

**Dimanche 29 mai:** ***stand de l'association EKC lors du forom des langues du monde***
Horaire : 10h00 à 19h00
Lieu : Place du capitole
Organisé par le Carrefour Culturel Arnaud Bernard
Pour aider sur le stand (installation à partir de 8h, besoin de monde!)
Contactez: Christophe 06 31 80 40 07
Ne manquez pas non plus la capitada, le samedi 28 mai, la veille, à partir de 17h, déjà place du Capitole!

**Lundi 30 mai à 17h :** ***Atelier de découverte de l'espéranto***
Horaire : 17h00 à 19h00
Lieu : Maison de Quartier de Rangueil, 19, rue Claude Forbin
Un aperçu de la langue et de sa culture en 2h(Metro Rangueil)
GRATUIT mais Places limitées INSCRIPTION PREALABLE NECESSAIRE
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84 ou esperanto.toulouse@free.fr

## JUIN - JUNIO 2011

**Vendredi 03 juin:** ***Repas-Tchatche/Manĝo-klaĉo***

Horaire: à partir de 20h00

Lieu : au 98, rue Riquet (Quenut)

Les traditionnels Repas-Tchatche mensuels continuent chez Marion en juin
Chacun apporte un peu à boire et à manger et on partage en parlant en espéranto. Pour pratiquer dans la bonne humeur!

Merci de prévenir Marion de votre venue : 06 87 64 75 84

**Sam /dim 4 et 5 juin - Week-end Découverte (et pratique) de l'espéranto**

Horaire : du sam. 10 h. au dimanche 17 h.
Lieu : Gîte La Maraude, 09800 ARROUT.
Niveau débutant : Découverte de la langue espéranto et de sa culture
+ 2 niveaux de conversation pour améliorer son niveau.
Atelier cuisine commun en espéranto, animé par Niko!
Déroulement : 8 h de cours, à répartir sur les deux jours. Soirée avec jeux et films en espéranto. Hébergement dans chambres de 3 ou 6 lits.
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84 ou 05 61 99 68 28

**Jeudi 09 juin - Soirée film**

Horaire: de 20h à 22h

Lieu : Le bâton à palabres, 15 rue de Thionville (quartier Colombette, Péri)

Film comique soviètique (en russe, sous-titré en espéranto)
**Ivan Vasiljeviĉ ŝanĝas la profesion**
Présenté par Anjo, notre volontaire ukrainienne

Tarif : 2 euros, une boisson sans alcool offerte

Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Mardi 14 juin : Conversation en espéranto**

Horaire : 19h30
Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48

**Vendredi 24 à dimanche 26 juin : stand de l'association EKC**
**dans le cadre du Festival Mondial de la Terre 2011**

Lieu : Jardin des plantes
Horaire : de 12h à 19 h env.
Pour aider sur le stand, contactez Marion : 06 87 64 75 84
Vendredi 24 à 14h: initiation à l'espéranto (45 min) à l'ombre d'un des arbres du jardin

**Lundi 27 juin : Apéro de fermeture de la Bibliothèque + Libroservo**

Horaire : 16h à 19h
Lieu : Maison de quartier Rangueil, 19 rue Claude Forbin, 31400 (Métro Rangueil, ou bus 34)
Dernière occasion de l'année pour emprunter et rendre vos livres, revues, BD à la bibliothèque...Nous profitons de l'occasion pour offrir l'apéritif et installer le libroservo et vous faire découvrir quelques nouveautés, certains livres bénéficieront de remises exceptionnelles.
Plus d'infos : contactez Marion : 06 87 64 75 84

**Mardi 28 juin : *Conversation en espéranto***

Horaire : 19h30
Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48